
ISSN 2072-5825

# Espero Katolika

## LA SANKTA PAPO JOHANO PAŬLO LA DUA - KUNPATRONO DE I.K.U.E.



Naskiĝo: 18.05.1920
Diakoniĝo: 20.10.1946
Sacerdotiĝo: 01.11.1946
Episkopiĝo: 28.09.1958
Episkopa devizo: Totus Tuus
Kardinalo ekde: 26.06.1967
Elektita papo: 16.10.1978
Intronizita: 22.10.1978
Mortinta: 02.04.2005
Beatigita: 01.05.2011
Kanonizita: 27.04.2014
Liturgia festo: 22-a de oktobro



Numero 1-3-2021

Januaro-Marto 2021

JARKOLEKTO 118 - N. 1194-1196 - Januaro/Marto 2021

*Sur la kovrilo:* La papo sankta Johano Paŭlo la Dua

## ENHAVO

LA FRATINO TERGLOBO PROTESTAS KONTRAŬ MALBONO, KIUN NI AL ĜI KAŬZAS 3
JOHANO PAŬLO LA UNUA: DATREVENO DE LA ELEKTO KAJ NOMUMO DE LA KOMITATO DE LA VATIKANA FONDAĴO DE LIA NOMO 4
BEATIGO DE CARLO ACUTIS 6
CARLO ACUTIS - PREĜO 7
Patrino Tereza: AMU LA VIVON TIAN, KIA ĜI ESTAS 7
„ĈI TIU EPIDEMIO DISBLOVIS LA FUMON DE ILUZIOJ“ 8
LA KRISTANA IDENTIGILO LAŬ PREDIKO DE LA SANKTA JOHN HENRY NEWMAN 9
PREĜO DE LA SANKTA JOHN HENRY NEWMAN 10
LA HOMO, KIUN SENDIS DIO 11
REMEMOROJ PRI LA RENKONTIĜO KUN LA PAPO SANKTA JOHANO PAŬLO LA DUA 12
ŜTUPARO KIEL LA BIDOJ DE ROZARIO 14
LA KONGREGACIO POR KREDINSTRUO MALAPROBIS INTERKOMUNION EN GERMANIO 15
LA 44-AJ PREĜTAGOJ EN ĈENSTOĤOVO, POLLANDO 16
NIGRA MADONO - kanto 18
EŬROPA ŜTATA DOKTRINO: ATEISMO 19
NI IOM RIDU 20

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA FRATINO TERGLOBO PROTESTAS KONTRAŬ MALBONO, KIUN NI AL ĜI KAŬZAS

### *Nia komuna hejmo – la tuta Tero estas kiel nia fratino*

Nia komuna hejmo – la tuta Tero – estas kiel nia fratino, kun kiu ni dividas nian komunan vivon. Tiu ĉi fratino protestas kontraŭ malbono, kiun ni kaŭzas al ĝi per nia senrespondeca uzado de ĝi kaj misuzado de tio bona, kion Dio en ĝin metis.

Ni elkreskadis kun imago, ke ni estas ĝiaj posedantoj kaj regantoj, kiuj rajtas ekspluatadi ĝin. La perforto enestanta en la homa koro vundita per peko, elmontras sin ankaŭ en signoj de malsanoj, kiujn ni trovas en grundo, akvo, aero kaj ĉe animaloj. Tial inter la malriĉajn, kiuj estas la plej forlasitaj kaj plej suferigitaj, viciĝas ankaŭ nia premata kaj detruata Tero, kiu „ĝemas kaj suferas“.

Sankta Francisko el Asizo estas frapa ekzemplo de vere travivata ekologio. Li estis mistikulo kaj pilgrimanto, kiu vivis en simpleco kaj admirinda harmonio kun Dio, kun aliuloj, kun naturo kaj kun si mem. En li estas senteble, ĝis kia grado estas nedisigeblaj zorgo pri la naturo, justeco rilate al malriĉuloj, ekuzo de ĉio por komunumo kaj interna paco. Tial li sin sentis kompetenta zorgi pri ĉio, kio ekzistas. Tiun ĉi konvinkon oni ne povas malrespekti kiel ian emocian romantismon, ĉar ĝi influas decidojn, per kiuj sin direktas niaj agadoj.

### *La naturo estas belega libro, per kiu Dio alparolas nin*

Se ni aliras la naturon kaj la vivmedion sen malfermiteco por mirego kaj admiro, se ni ne parolas en nia rilato al la mondo per lingvo de frateco kaj beleco, restas niaj sintenoj similaj al sintenoj de reganto, konsumanto aŭ de nura ekspluatanto de la naturfontoj, de la nekapablulo meti limojn al siaj senperaj interesoj.

Sankta Francisko fidela al la Skribo nin ankaŭ instigas, ke ni en la naturo distingu belegan libron, per kiu nin alparolas Dio kaj sciigas al ni ion el sia beleco kaj boneco. La mondo estas io pli ol nura problemo, kiun oni bezonas solvi.



La insista alvoko al protektado de nia komuna hejmo enhavas strebon unuigi la tutan homan familion en serĉado de konservebla kaj tuteca disvolvo. Specifan dankemon meritas precipe tiuj, kiuj insiste batalas por solvo de la dramecaj konsekvencoj, kiuj la malbonigon de la vivmedio enportas en la vivon de la plej malriĉaj homoj de la mondo. Kiel estas eble konstrui pli bonan estonton kaj ĉe tio ne pensi pri la krizo de la vivmedio kaj suferado de ekskludiĝintoj? Bedaŭrinde, multaj streboj trovi konkretan solvon de la krizo ofte kunpuŝiĝas ne nur kun rezisto de potenculoj, sed ankaŭ kun indiferenteco de la ceteraj. La sintenoj, kiuj ankaŭ inter kredantoj metas obstaklojn sur vojon al tiuj solvoj, etendiĝas ekde neado de la problemo ĝis indiferento, komforta rezignacio aŭ blinda espero je teknikaj solvoj. ■

*Laŭ dokumento de la papo Francisko „Laudato si“*

# JOHANO PAŬLO LA UNUA: DATREVENO DE LA ELEKTO KAJ NOMUMO DE LA KOMITATO DE LA VATIKANA FONDAĴO DE LIA NOMO

La 26-an de aŭgusto 2020 okazis la 42-a datreveno de elekto de la papo Johano Paŭlo la Unua. Tiuokaze estis publikigitaj nomoj de la membroj de la sciencista komitato de la vatikana fondaĵo portanta nomon de la papo Albino Luciani, kies celo estas subteno de la internacia esploro kaj studado de la pensado kaj instruo de tiu ĉi papo. La fondaĵon dekretis la papo Francisko februare de la jaro 2020.



Johano Paŭlo la Unua, en amaskomunikila spaco konata kiel „ridema papo“, restis sur la seĝo de Petro nur 33 tagojn kaj lia pontifikeco apartenas al la plej mallongaj en la historio. Pro sia simpla stilo kaj senperemo, kun kiu li sin turnadis al la kredantoj, li facile gajnis homajn korojn kaj sendube ankaŭ lokon en historio de ŝanĝoj de la Petra servo en la 20-a jarcento.

Li strebadis pri revivigo de la vera kredo en civito de la kredantoj kaj la vera kristana ĝojo eliranta el la resurektinta Kristo. Li abundis ankaŭ per universala misia entuziasmo. Dum la meso por la mortinta Johano la Dudektria junie de 1963 li diris: „La ideo de la papo Johano, kiu plej multe trafis mian spiriton, estas tiu ĉi: Ecclesia Christi lumen gentium! La Eklezio devas alportadi lumon ne nur al katolikoj, sed al ĉiuj, ĝi apartenas al ĉiuj, ni devas klopodi pri ĝia alproksimigo al ĉiuj homoj.“ Malfacile oni povus hodiaŭ al si imagi, kiel ne memevidente sonis en oreloj de la konciliaj patroj tezoj pri la libereco de la konfesioj – ja kiel kunigi de Kristo ordonitan devon heroldi evangelion ĝis fino de la mondo kun ekspansio de aliaj religioj kaj nekredado? La venecia patriarĥo Albino Luciani reflektas antaŭtimojn de iuj episkopoj respondante: „Se vi volas, ke el viaj infanoj ne fariĝu budhanoj kaj islamanoj, pli bone vi devas instrui al ili katekismon, instrui ĝin tiel, ke ili estu vere konvinkitaj pri sia katolika religio.“

La jaro1978 ne estis nur la jaro de tri papoj, sed en la itala medio ankaŭ kulminanta batalo de ruĝaj brigadoj, kiuj kulminis per murdo de Aldo Moro, kaj tial ĝi estas signata kiel la plej malhela periodo de la respubliko. En reflekto super okazintaĵoj movantaj tiaman komunumon ni ekkonas pluajn trajtojn kaj opiniojn de la venecia patriarĥo Albino Luciani senpere antaŭ lia alveno sur la seĝon de Petro. Super ĉerko de la ĵurnalisto murdita februare de la tiama jaro li diris: „Kiel episkopo, nome de la kredo kaj homrajtoj, mi devas signi tiun ĉi staton de la aferoj kiel netolerebla kaj postuli ĉiujn homojn de la bona volo, apartenantajn al kiu ajn instituto aŭ partio, ke ili ĉesigu tion.“ Li celiĝis al marksisma difino el lernejaj lernolibroj, laŭ kiuj estas „revolucio necesa konsekvenco...“ kaj komentis: „Ja eĉ al infanoj de la infana aĝo en iuj lernejoj estas proklamata neceso de revolucio.“ Se la membroj de ruĝaj brigadoj sin signigas kiel „soldatoj batalantaj la sanktan militon“, Luciani aldonadis, ke „la kristanismo kiun ajn malamon eliminas“. – „Tiu, kiu hodiaŭ dissemas venton de malamo, morgaŭ li rikoltos ŝtormon.“ Kiam poste en la majo la revolu-

ciaj kisadoj eliĝis en murdon de Moro, la estonta papo skribis: „Se la bona homaro estas longtempe enpumpita per acido de malamo, se tagon post tago estas sisteme likviditaj civitanaj kaj homaj valoroj, la gepatra kaj instruista aŭtoritatoj kaj sankteco de familio...



elmerĝos ankoraŭ multe da pli aliaj aferoj ol tupamaros!“(movado de nacia liberigo) – li avertis invokante sin al urugvaja gerilo. Anstataŭ tio li postulis de politikistoj „justan politikan stilon kaj saĝajn socialajn aranĝojn“. Al intelektuloj kaj ĵurnalistoj li metis sur la koron respondecon – ja: „Ĉiu ideo, ĉiu vorto, estas ĝermo, el kiu povas elkreski fruktoj bonaj aŭ malbonaj. Kio estas dirite, tralegite, skribite, transdonite, ne enfalas teron de neniu, sed influas la vivajn homojn, ĝi infiltras ekzistajn situaciojn kaj vivdecidojn.“ Kaj de ĉiuj homoj li postulis „Eliri el griza kaj pasiva neŭtraleco“, ĉar: „Ĉu ne estas malbraveco de tiu, kiu sin stari-




gas por neniu idealo, pereiga?“

Beatiga procezo de la papo Johano Paŭlo la Unua daŭras ekde la jaro 2003. Post la trijara dioceza fazo estis aktoj senditaj al Romo, kie arigitan dokumentaron pri la vivo de Albino Luciani reviziis Kongregacio por sankproklamoj. Tiu ĉi detala reviziado estis fermita en la jaro 2017. Por beatproklamo nun do mankas revizio de supernatura okazaĵo je propeto de Luciani. La fakuloj tiumomente revizias laŭdiran eksterordinaran resaniĝon, kiu okazis en diocezo BuenosAjreso en la jaro 2011. ■

*Laŭ www. vaticannews.va*

***Tombo de la papo Johano Paŭlo la Unua en la groto de la vatikana Baziliko de Sankta Petro***

**La papo Johano Paŭlo la Unua - Albino Luciani - naskiĝis la 17.10.1912 en Forno de Canale, Italio. La 26.8.1978 li estis elektita kiel 263-a posteulo de la s-ta Petro. La 26.9.1978 li mortis.**



# BEATIGO DE CARLO ACUTIS

Italio havas ekde la 10-a de oktobro 2020 novan beatulon.

„Carlo Acutis, kiu kun entuziasmo de sia juneco praktikis amikecon kun Jesuo Kristo kaj centron de sia vivo li igis la Eŭkaristion kaj atestadon de la mizerikorda amo, estas ekde la 10-a de oktobro 2020 beatproklamita kaj lia ĉiujara liturgia rememoro estis fiksita je la 12-a de oktobro," deklaris en beatiga formulo kardinalo Agostino Vallini, kiu prezidis sabatan beatigon en la supra baziliko de la s-ta Francisko en Asizo. Carlo Acutis naskiĝis en Londono, vivis en Milano, de kie devenas liaj gepatroj, ĉeestintaj la beatigon, kaj ankaŭ en Asizo, kie li ĉerpis el spiriteco de la sankta Francisko. Li foriris en eternecon en la jaro 2006 en sia 15-a jaraĝo, kiam li ekmalsanis je sangokancero, kaj estas entombigita en baziliko de la Senvestigo en Asizo.

La kardinalo Vallini en sia homilio citis tiun ĉi junulon, kiu estis ekde sia infana aĝo allogata per la respekto de Eŭkaristio. „»La Eŭkaristio estas mia aŭtovojo en la ĉielon,« li ofte diradis. Li ĉiutage ĉeestis la sanktan meson kaj longe li adoris la Plejsanktan Sakramenton. »Ke en la Paradizon oni iras rekte, se oni ĉiutage akceptas la Eŭkaristion!« – estis konvinkita la novbeatulo, kiu ege sensis vokiĝon helpadi al aliuloj trovadi proksimecon de Dio kaj belecon de ĉeestado kun Li. „Tiucele li ankaŭ uzadis interreton," emfazis la kardinalo Vallini. „Li komprenis, ke la interreto ne estas nura ilo de amuziĝo, sed ankaŭ spaco por dialogo, ekkono, komuniko, reciproka estimo kaj respondeco, sen esti sklavigita pere de ĝi. Li sciis, ke en senborda virtuala mondo estas necese scii distingadi bonon disde malbono. En tiu ĉi pozitiva perspektivo li instigis al uzado de la modernaj komunikiloj por disvastigo de evangelio kaj por alparoli kiom eble plej multe da homoj, por ke ili povu sperti belecon de al la amikeco kun la Sinjoro. Tiucele li ekzemple kreis interretan paĝon, en kiu li publikigis konatajn eŭkaristiajn miraklojn el la tuta mondo kaj kiun li ankaŭ uzadis dum katekizado de infanoj. Li tre estimis Patrinon de Dio preĝante ĉiutage rozarion kaj sin konsekris al la Virgulino Maria. La preĝo kaj misio estis karakterizaj punktoj de la heroa kredo de Carlo Acutis, kiu en sia mallonga vivo sukcesis sin konfidi al la Sinjoro dum ĉiuj cirkonstancoj, precipe dum tiuj plej malfacilaj," emfazis la kardinalo Vallini, la predikanto en la sabata beatiga liturgio de Carlo Acutis en Asizo. ■

*Radio Vaticana, 10.10.2020*



## CARLO ACUTIS - PREĜO

Ni dankas Vin, Sinjoro, sankta Patro, Dio ĉiopova kaj eterna, en Vi estas la fontoj de la vivo kaj de la ĝojo. Vi donacis al la Eklezio beatan Karlon Acutis, amatan disĉiplon, kiu anoncis kun ĝojo la Evangelion al la gejunuloj de nia tempo, perturbitaj, sed plenaj de entuziasmo.

Junulo beata pro la fido, li celis per siaj okuloj Kriston vian Filon, kontemplatan en la Eŭkaristio: la aŭtovojon al la ĉielo.

Junulo gaja en la karitato, li celis per siaj okuloj plenaj de tenereco la gefratojn, precipe la plej malriĉajn.

Junulo kuraĝa en la espero, li oferis siajn suferojn, amante la Eklezion ĝis la donaco de si mem.

Ni Vin petas, per lia propeto, vivi kiel originaloj kaj ne kiel fotokopioj, kontentiĝante je tio, kio forpasas. Kaj kiel aerbalono por supreniri bezonas malŝarĝi la balaston, tiel ni povu vivi kun la rigardo turnita al Vi, forlasante la pezaĵojn de indiferenteco kaj de egoismo por krii, fine, kun nia amiko Carlo: ne mi, sed Dio!

*Asizo, la 10-an de oktobro 2020*



Ho Dio, nia Patro, dankon ĉar vi donis al ni Carlon, modelon de vivo por la gejunuloj, kaj mesaĝon de amo por ĉiuj. Vi igis lin enamiĝi al via filo Jesuo, igante la Eŭkaristion lia „aŭtovojo al la ĉielo“. Vi donis al li Marian, kiel amegatan Patrinon, kaj igis lin per la Rozario kantisto de ŝia tenereco. Akceptu lian preĝon por ni. Rigardu precipe al la malriĉuloj, kiujn li amis kaj sukuris. Ankaŭ al mi konsentu, pro lia propeto, la gracon, kiun mi bezonas… Kaj igu plena nian ĝojon, metante Carlon inter la beatulojn de via Sankta Eklezio, por ke lia rideto ankaŭ brilegu por ni je gloro de via nomo. Amen.

Patro nia, Saluton Maria, Gloro… ■

*Ambaŭ preĝojn tradukis D-ro Antonio de Salvo*

## Patrino Tereza: AMU LA VIVON TIAN, KIA ĜI ESTAS

Amu la vivon tia, kia ĝi estas.
Amu ĝin plene, sen pretendoj;
amu ĝin, kiam oni amas vin, aŭ kiam oni
vin malamas,
amu ĝin, kiam neniu vin komprenas,
aŭ kiam ĉiuj komprenas vin.
Amu ĝin, kiam ĉiuj vin forlasas,
aŭ kiam oni altigas vin kvazaŭ reĝon.
Amu ĝin, kiam oni forŝtelas de vi ĉion,
aŭ kiam oni ĉion donacas al vi.
Amu ĝin, kiam ĝi havas sencon,
aŭ kiam ŝajnas, ke ĝi havas eĉ ne ereton
da tio.
Amu ĝin en la plena feliĉo,
aŭ en la absoluta soleco.
Amu ĝin, kiam vi estas forta,
aŭ kiam vi sentas vin malforta.
Amu ĝin, kiam vi havas timon,
aŭ kiam vi havas amason da kuraĝo.
Amu ĝin ne nur pro la grandaj plezuroj
kaj la enormaj kontentigoj;
amu ĝin ankaŭ pro la tre malgrandaj ĝojoj.
Amu ĝin, kvankam ĝi ne donas al vi tion,
kion ĝi povus,
amu ĝin ankaŭ, se ĝi ne estas tia, kian vi
ĝin volus.
Amu ĝin ĉiufoje, kiam vi naskiĝas
kaj ĉiufoje, kiam vi estas mortonta.
Sed neniam amu sen amo.
Neniam vivu sen vivo!

# „ĈI TIU EPIDEMIO DISBLOVIS LA FUMON DE ILUZIOJ“

***La kardinalo Robert Sarah, la prefekto de Kongregacio de la Dia Kulto, donis la 9-an de aprilo 2020 longan intervjuon je la temo de la pandemio de la kronviruso al la ĵurnalistino de la franca revuo Valeurs Charlotte d´Ornella.***

*D´Ornella:* **Kion vi, estimata kardinalo, opinias pri la krizo kaŭzita per la kronviruso?**



*Kardinalo Sarah:* Ĉi tiu viruso ekagis kiel atentigo. Ŝajnas, ke dum kelkaj semajnoj falis granda iluzio de la materia mondo, kiu kredis, ke ĝi estas ĉiopova. Antaŭ kelkaj tagoj politikistoj parolis pri la kresko de pensioj, pri la redukto de senlaboreco. Ili estis memkonfidaj. Kaj jen nun la mikrodimensia viruso faligis sur genuojn mondon, la mondon, kiu fiksadis rigardon en sin mem, kontempladis sin mem kiel ebria de memkontenteco kaj asertante, ke ĝi estas ĉiorezistema.

La nuna krizo estas parabolo. Ĝi malkaŝas, ke ĉio, kion oni komunikadis al ni por kredi, estas tre malkonstanta, rompebla kaj malplena. Oni diradis al ni: vi konsumu sen limigoj! Sed la mastrumado rompiĝis, kaj borsoj falas. Ĉie estas videblaj bankrotoj. Oni promesadis al ni ĉiam pli antaŭen ŝovadi la limojn de la homa naturo danke al la triumfanta scienco. Oni diradis al ni pri la artefarita fekundigado, pri la anstataŭiga patrineco, transhumanismo, pri la plibonigata homeco. Oni laŭdegadis al ni la artefaritan homon kaj homaron, kiu devas estiĝi malvenkebla kaj nemortebla kaŭze de bioteknologio. Sed jen ni estas ektimegitaj, izoligitaj kaŭze de la viruso, pri kiu ni preskaŭ nenion scias. La epidemio estis la vorto malnovtempa, mezepoka. Ĝi tuj estiĝis nia ĉiutageco.

Mi opinias, ke ĉi tiu epidemio disblovis la fumon de la iluzioj. Tiel nomata ĉiopova homo troviĝas en sia malmola realeco. Ĝi sin montras nuda. Oni okulfrape vidas ĝian malfortemon kaj rompeblemon. Mi esperas, ke la deviga enŝlosiĝo en hejmoj permesos al ni orientiĝi al novaj, la plej gravaj aferoj, kaj denove permesos al ni malkovri la signifon de niaj rilatoj al Dio, do la centran lokon de la preĝo en la homa vivo. Kaj konsciante pri nia fragileco ni fide turnu nin al Dio kaj al lia patra mizerikordo.

La sperto de la deviga izoliteco permesis al multaj homoj denove malkovri la fakton, ke reale kaj konkrete ni estas dependaj unu de la alia. Kiam ĉio disfaliĝas, restas nur ligoj geedzaj, familiaj kaj amikecaj. Ni malkovris denove, ke kiel membroj de la nacio ni estas ligitaj per nevideblaj, sed realaj ligoj. Kaj antaŭ ĉio ni malkovris denove, ke ni apartenas al Dio. ■

El revuo Michael, 8-9/2020
Esperantigis Stanisław Śmigielski

**VIRTUALAJ RENKONTIĜOJ DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ**

**Bv. partopreni la virtualajn renkontiĝojn de la katolikaj esperantistoj kaj la komunajn preĝojn de la rozario.**

**La interesatoj pri la partopreno bv. vin anonci ĉe IKUE reto: ikue.reto@gmail.com por ricevi pluajn informojn.**

# LA KRISTANA IDENTIGILO LAŬ PREDIKO DE LA SANKTA JOHN HENRY NEWMAN

Sankta John Henry Newman (1801 – 1890) estis profunde konvinkita pri la lumo kaj forto de kredo je Jesuo Kristo. Li rekonis la imponajn evoluojn de sia jarcento, aprezis la progreson en la socia vivo, uzis rimedojn de la mondo. Samtempe li senĉese invitis la fidelulojn ne lasi sin kontamini per la spirito de la mondo. Li ripetis, ke kristanoj estas vokitaj vivi „en la mondo“, sed ne esti „de la mondo“, sekvante la Sinjoron Jesuon, veran Majstron kaj Paŝtiston (komparu Joh 17, 14-16).



En la prediko donita la 5-an de februaro 1843, titolita „La apostola kristano“, Newman pridemandas sin, kiel la unuaj kristanoj vivis sian specifan mision en la mondo. Eĉ konsciante, ke hodiaŭaj fideluloj ne povas simple imiti la unuajn kristanojn, la predikanto invitas la aŭskultantojn turni sian rigardon al la bildo de bibliaj kristanoj, kun la celo lasi sin inspiri per ilia ekzemplo. Li citas grandan nombron da bibliaj fragmentoj reliefigante tri trajtojn, kiuj laŭ li distingas la disĉiplojn de la Sinjoro Jesuo.


La unua el ĉi tiuj karakterizaĵoj estas la orientiĝo al ĉielo. „Kristano vivas en la mondo, sed ne apartenas al ĝi, ĉar laŭ Sankta Paŭlo ‘nia hejmlando estas en la ĉielo‘ (Fil 3,20): kiu ajn konfesas kristanismon, tiu estas civitano de alia mondo, la supernatura. Ni scias, kion signifas esti civitanoj de ĉi tiu mondo: tio signifas havi interesojn, rajtojn, privilegiojn, devojn kaj rilatojn en specifa urbo aŭ en specifa ŝtato, aparteni al ĝi. La kristano estas ligita al ĉielo; la ĉielo, ne la tero, estas lia patrujo.

Por kristanoj do la ĉielo havas nomon kaj vizaĝon: tiun de Jesuo Kristo. Newman povas do aserti, ke „la plej profunda difino farebla pri la kristano” estas tiu: „La kristano estas tiu, kiu atendas Kriston; kiu ne atendas avantaĝojn, distingojn, potencojn, plezurojn aŭ konsolojn, sed nur nian Sinjoron Jesuon Kriston, la Savanton”.

El ĉi tiu rigardo al la Sinjoro Jesuo ni povas dedukti iujn sintenojn, kiuj estas tipaj por la kristanoj de la apostola epoko. Inter ĉi tiuj Newman elstarigas ĉefe viglecon, menciitan de la Evangelio en multaj paŝoj kaj la disponeblon al kontinua preĝo: „Kristo loĝis en iliaj koroj, kaj ĉio kio en iliaj koroj aperis, pensoj, vortoj kaj agoj, ne povis ne porti spuron de Li”. La kristana religio, laŭ Newman, „komenciĝas per la konvertiĝo de tera idealo al supernatura idealo“.

Ĉi tiu interna orientiĝo de la kristanoj al la ĉielo implikas duan karakterizaĵon: deigon de la aferoj de ĉi tiu mondo. Laŭ la atesto de la Nova Testamento, la unuaj kristanoj estis konvinkitaj, „ke la surtera vivo estas nenio antaŭ la absoluta valoro de tio, kio atendas nin. Multaj el ili do rezignis pri siaj havaĵoj, ofertis siajn plej karajn dezirojn al la Sinjoro kaj pretis esti kalumniitaj kaj persekutitaj pro Jesuo.

Post ĉi tiuj du trajtoj sekvas, laŭ Newman, tria distinga elemento por la unuaj kristanoj: „ili devis ĝoji pro tio, ke ili estis konsiderataj veraj kristanoj“. Newman priskribas veran kristanan ĝojon per kortuŝaj vortoj: „Ne nur pureco de koro, ne nur agemo, sed ankaŭ ĝojo de la vizaĝo devis regi. Mi parolas pri ĝojo en ĉiuj ĝiaj manifestiĝoj,



ĉar, kiam ĝi estas sincera, ĝi kunportas multajn donacojn de graco. Ĝojo, se ĝi fontas el kredo, la perfekta ĝojo naskita de suferoj kaj persekutado, igas homojn pacaj kaj serenaj, igas ilin dankemaj, bonkoraj, amemaj, plenaj de dolĉeco, boneco kaj espero; ĝi estas ĝentila, milda, kortuŝa kaj konvinka. Jen la ĝojo, kiu karakterizis la kristanojn de la Nova Testamento; la homojn, kiuj akiris tion, kion ili deziris. Tiuj, kiuj vidis Kriston, kiuj amis lin, kiuj kredis al li kaj ĝojis pro li, ankaŭ elektis oferi la mondon kun ĉiuj ĝiaj varoj pro la amo de la Majstro. Ĉi tiu ĝojo plenigis korojn de la kristanoj de la apostola epoko, ankaŭ kaj ĉefe en la persekutoj pro ilia kredo je la Sinjoro Jesuo, kiel montras multaj paĝoj de la Nova Testamento.

Newman petas la fidelulojn mediti pri ĉi tiu bildo de la apostola kristano, ne fermi okulojn al la defio, kiun ĝi reprezentas. Ne timi lasi sin entuziasmigi kaj kuraĝigi. Konsiderante, ke la tempoj ŝanĝiĝas kaj sekvado de la Sinjoro povas adopti tre malsamajn formojn, ĉi tiu bildo de kristanoj devas esti tradukita kaj ĝisdatigita senĉese, sed ĝi restas valida modelo por fideluloj de ĉiuj epokoj.

La prediko de Newman pri la apostola kristano, farita antaŭ lia konvertiĝo al la Katolika Eklezio, prezentas al ni ian kristanan identigilon. La koro de la fideluloj radikas en Kristo, kiu invitas ilin, laŭ la vokiĝo de ĉiu, malligi sin de la nuntempa Spirito kaj trovi jam nun la veran ĝojon.

„Ĝoju ĉiam en la Sinjoro” skribas Sankta Paŭlo al la Filipianoj, „mi ripetas denove al vi, ĝoju! Via mildeco estu konata al ĉiuj homoj. La Sinjoro estas proksima! (Fil 4, 4-5)

Se kristanoj restas fidelaj al ĉi tiu identeco, ili povas esti apostoloj kaj gustigi la hodiaŭan mondon ankaŭ per la „salo“ de la Evangelio. ■

*El la mesaĝo de la Internacia Centro de geamikoj de Newman esperantigis Jitka Skalická, Romo*

## PREĜO DE LA SANKTA JOHN HENRY NEWMAN

Konduku min, sanktega Lumo, per via amata ŝirmo, ho Lumo eterna! La nokto nigra, la domo tiel malproksima, do Vi min konduku! Ne petas mi vidindan, foran Edenon. Sufiĉas radio por la hodiaŭa paŝo, ho Dio mia!

Ne ĉiam same mi preĝis, ho eterna Lumo! Sola mi volis laŭ mia sentemo elekti la vojon, malgraŭ tio, ke mi kun tremo soifegis belecon, fidante al mia forto. Pardonu la pasintajn farojn!

Vi ĉiam daŭras, dum surda nokto: arbare, dezerte vagis mi fiera. Ho, gardu min! Ĝis la nokto estos pasinta, ĝis tagiĝo ree malkovros la karajn figurojn, kiujn mi ekkonis, kaj kiujn mi perdis. Amen.

# LA HOMO, KIUN SENDIS DIO

***En junio de la jaro 1996 Johano Paŭlo la Dua jam la trian fojon vizitis Germanion. Diference de antaŭaj du pilgrimoj ne plu estis ĉi tiu lando dividita. La papo el Pollando unuafoje povis viziti Berlinon.***

Ankoraŭ en januaro 1989 Erich Honecker, la komunista gvidanto de Germana Demokratia Respubliko, publike esprimis la opinion, ke la berlina muro restos almenaŭ dum kvindek jaroj, kaj eble eĉ dum cent, se ne malaperos la kialoj, por kiuj ĝi estis konstruita. Michael Meyer, skribinte pri ĉi tiu afero en marto 1989 sur la paĝoj de „Newsweek“, konkludis sian konsideron tiamaniere: „Antaŭ ol ĝi falruiniĝos, pasos multaj jaroj, kaj eble la tutaj generacioj. Du partoj de Germanio neniam plu estigos la tuton“.

La Papo el Pollando havis je tio la alian opinion. Post tio, kiam en septembro 1989 komenciĝis la amasaj demonstracioj de la loĝantaro de GDR, al la 12-a de oktobro li vokis al Vatikano la episkopojn de ambaŭ partoj de Germanio. Apenaŭ ses tagojn pli poste Honecker forlasis la oficpostenon. La lastan registaran akton li subskribis la 16-an de oktobro – ĝi estis la gratulletero al Johano Paŭlo la Dua lige kun la 12-a datreveno de lia elekto al Sankta Seĝo.

La etoso, kiu anticipadis la venon de la Sankta Patro al Germanio, ne estis por li favora. La ondo de la malamikeco al Eklezio transiradis malproksime al la argumentita kritiko. Karl Heinz Hock rimarkis, ke „apenaŭ 50 jaroj post la falo de naziistoj la malhonorigado de religio estiĝis moda“. „Estis eĉ ne unu tago, por ke en amaskomunikiloj ne estu kalumniita la Papo, episkopoj aŭ la veroj de la kredo“ – konstatis la ĉefredaktoro de KNA.

En la malfrua posttagmezo la 21-an de junio 1996, salutante Johanon Paŭlon la Duan sur la aerodromo de Paderborn, la ŝtatprezidento de Germanio Romano Herzog diris: „La mondo estiĝis alia. Ni, germanoj, profitis el tio precipmaniere. Hodiaŭ mi deziras esprimi ĉi tie profundan dankegon pro ĉio, kion Vi faris kiel la Papo kaj kiel la homo por alkonduki al falo la feran kurtenon. La pli granda parto de la movado por la libereco en la Orienta Eŭropo trovis en Vi la apogon kaj la helpon“.

La lasta etapo de la papa vizito estis la renkontiĝo en Berlino ĉe la Brandenburga Pordego. Eberhard Diepgen, la urbestro de Berlino, salutante Johanon Paŭlon la Duan tiuloke diris: „La fakto, ke Via Sankteco povas alparoli ĉi tie la berlinanojn, ĉiujn germanojn kaj eŭropanojn, estas – kiel mi asertas, la esprimo de la historia justeco. Tio okazis per la ĉeesto de la papo devenanta el Pollando, kiu ne posedas diviziojn, sed kiu konfuzis la komunisman sistemon per la forto de la vorto kaj vero“.

Laŭvice Helmut Kohl, la kanceliero de Germanio, asertis: „Ni, germanoj, tre multe dankoŝuldas al Vi. Ĉar Vi kontribuis decidmaniere al superigo de la totalisma, kontraŭkristana ideologio, kiu dividis nian kontinenton, nian landon kaj ĉi tiun urbon. Vi helpis tiamaniere al ni efektivigi la revon pri la reunuigo de Germanio. Vi neniam konsentis kun ĉi tiu kontraŭnatura divido de Eŭropo per la fera kurteno. Kaj ĝuste Vi kapablis inspiri per la kuraĝo milionojn da homoj, kiuj ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj estis devigitaj vivi sub la regado de la komunisma reĝimo, dirante al ili, ke ili ne perdu la esperon, ke iutage ili ĝisatendos liberecon“

Post la fino de la papa vizito de Germanio la komentisto de „L´Osservatore Romano“ skribis: „Ankoraŭ antaŭ la vojaĝo el multaj flankoj estis esprimata konvinko, ke la germanaj katolikoj ne atendas la papon. Kelkaj revuoj, anoncante sin katolikaj, provadis eĉ apogi ĉi tiun tezon per la rezultoj de la sondaĵoj de publika opinio. Neniam ĝis nun la faktoj tiel unusignife forstrekis antaŭvidaĵojn, neniam ĝis nun estiĝis tiel surdiga silentado de la amaskomunikiloj, kiuj spite de la faka etiko ne volis rekoni sian eraron“. ■

*Sebastian Karczewski*

*El la taggazeto Nasz Dziennik, 16-17/2020,*
*esperantigis Stanisław Śmigielski*

# REMEMOROJ PRI LA RENKONTIĜO KUN LA PAPO SANKTA JOHANO PAŬLO LA DUA

***En la jaro 2020 okazis gravaj jubileoj ligitaj al la papo sankta Johano Paŭlo la Dua. Dum la jaro de tiuj ĉi gravaj jubileoj dum okazintaj Virtualaj Tagoj de la katolikaj esperantistoj (14-21.8.2020) kaj dum la virtuala renkontiĝo la 24-an de oktobro estis denove rememorita la sankta Johano Paŭlo la Dua. Rememore pri li por la programo kontribuis Marija Belošević el Kroatio, Miloslav Šváček el Ĉeĥio kaj Cristian Mocanu el Rumanio. Jen sekvos rememoro de Miloslav pri liaj renkontiĝoj kun Johano Paŭlo la Dua.***

## Rememoroj pri mia renkontiĝo kun la papo Johano Paŭlo la Dua

Karaj gefratoj, karaj geamikoj, antaŭ du tagoj (la 22-an de oktobro 2020) estis liturgia festo de la karmemora papo sankta Johano Paŭlo la Dua. En la nuna jaro pasis 100 jaroj ekde lia naskiĝo la 18-an de majo de la jaro 1920 kaj 15 jaroj post lia morto en la 2-a de aprilo de la jaro 2005.

Memorante tiun ĉi gravan papon, kiu tre kontribuis al falo de ruĝa drako – do de komunismo en landoj de la Orienta Eŭropo, mi rememoras du momentojn de mia renkontiĝo kun li, kiuj profunde enskribiĝis en mian koron.


La sankta patro Johano Paŭlo la Dua trifoje vizitis nian landon – Ĉeĥan Respublikon. La unua lia vizito okazis baldaŭ post la falo de komunismo en la jaro 1990, la dua en la jaro 1995 kaj la tria en la jaro 1997. Kaj mi do volas en mia rememoro halti ĉe lia dua vizito de nia lando.

Mi loĝas en la vilaĝo situanta nur 15 kilometrojn for de la dua je historiaj monumetaĵoj plej riĉa urbo de Ĉeĥio, en la landparto Moravio, en la urbo Olomouc, kiun la 21-an de majo 1995 vizitis la papo Johano Paŭlo la Dua pro kanonizado de la martiro – la beatulo Jan Sarkander kaj la beatulino Zdislava el Lemberk.

La sankta Johano Sarkander naskiĝis en la jaro 1576 en Skoĉovo, nuntempe la pola urbo Skoczów, kaj en la jaro 1620 li estis fare de la tiamaj protestantaj gravuloj torturita kaj martirigita kaŭze de malvera kulpigo pri landperfido. En la majo 1860 li estis beatigita.

La dua persono, pro kiu venis al la urbo Olomouc la papo Johano Paŭlo la Dua, estis la beatulino Zdislava el Lemberk, naskiĝinta verŝajne en la jaro1220 en la moravia urbo Křižanov, edziniĝinta al grandsinjoro Havel Markvartic el Lemberk. Ŝi estas patronino de la familioj.

Kiel mi jam menciis, la dua vizito de la papo Johano Paŭlo la Dua okazis maje 1995. La solenoj komencis la 21-an de majo 1995 per la sankta meso sub vasta ĉielo en la urbo Olomouc kun kanoniza liturgio. La solenan liturgion, kies ĉefcelebranto estis la papo Johano Paŭlo la Dua ĉeestis kvaronmiliono da kredantoj. Danke al propono de la esperantistoj el la pola naskiĝloko de Johano Sarkander, mi estis elektita por kunporti la oferdonojn al la papo dum la solena sankta meso. Post alporto kaj transdono de la oferdono al la papo mi lin petis pri la beno por



*De la Sankta Patro mi akceptas la sanktan komunion*

aktivadoj de la katolikaj esperantistoj. Li kapjesis kaj benis, kaj transdonis al mi la rozarion, kiun mi ŝatas kiel ŝatatan rememoron de la memorinda okazintaĵo. Poste mi ankaŭ de la papo akceptis la sanktan komunion.


La sekvan tagon okazis en la pilgrimloko apud Olomouc – en Svatý Kopeček – Sankta Monteto – antaŭ la sanktejo de la Vizito de la Virgulino Maria renkontiĝo kun ĉirkaŭ 17-mila ĉeesto de la junularo, kiuj la Sanktan Patron bonvenigis per la ekzaltita saluto: „Otče, Svatý Kopeček plný je Tvých oveček!“ – „Patro, la Sankta Monteto plenas de viaj ŝafetoj!“ Tiu ĉi vizito de la Sankta Patro Johano Paŭlo la Dua donis novan forton al la katolikoj firme stari en la kredo.

La dua mia renkontiĝo okazis kun la papo Johano Paŭlo la Dua en la jaro 1997. Tiujare okazis jubilea 50-a kongreso de IKUE. Ĝia unua parto okazis en Romo kaj la dua en Rimini en Italio.

Merkredon la 3-an de septembro 1997 la kongresanoj ĉeestis la ĝeneralan aŭdiencon de la papo sur la vatikana Placo de la Sankta Petro. Tri reprezentantoj de IKUE - D-ro Antonio de Salvo - eksprezidanto de IKUE, Sac. Duilio Magnani - la prezidanto kaj mi - Miloslav Šváček - la tiama vicprezidanto, havis la honoron dum la aŭdienco ĉeesti proksime ĉe la Papo. Ni transdonis al la Papo nome de IKUE-anoj donacon – la blanke binditajn Meslibron kaj Legaĵaron en Esperanto.

Dum mi prezentis min al la papo kaj por proksimigi al li, de kie mi venis, mi diris al li, ke mi loĝas en Ĉeĥio proksime de la urbo Olomouc kaj de la pilgrimloko Sankta Monteto, kie dum lia renkontiĝo kun junularo en la jaro 1995 la gejunuloj lin bonvenigis per la saluto: „Otče, Svatý Kopeček plný je Tvých oveček!“ – „Patro, la Sankta Monteto plenas de viaj ŝafetoj!“ La Sankta Patro ridetante kaj kapjesante konfirmis, ke li tion bone memoras. Do tio estis mia dua neforgesebla renkontiĝo kun la sankta Papo Johano Paŭlo la Dua. Post tio ankoraŭ okazis renkontiĝo de ĉiuj 300 kongresanoj kun la itala ŝtatprezidento Oscar Luigi Scalfaro en la prezidenta sidejo en Romo.

Kaj ankoraŭ unu mia travivaĵo el Vatikano ne plu rilatanta la papon. Januare de la jubilea jaro du mil okazis en Romo estrara kunveno de IKUE. La kunvenantoj tiam partoprenis sur la Placo de la Sankta Petro vesperan preĝon de la jubilea jaro. Ĝi estis pere de satelitaj televid-transportiloj videbla en la tuta mondo. Dum ĝi mi estis komisiita diri jenan preĝintencon esperantlingve: „Por



*Mi interparolanta kun la Sankta Patro, meze estas D-ro Antonio de Salvo, dekstre sac. Duilio Magnani*

tiuj, kiuj estas elprovataj pro la Evangelio: ke dum iliaj suferoj ili estu subtenataj de la interveno de la gefratoj en la kredo, ni en Esperanto preĝu“.

Tiam inter la ĉeestantaj ekleziaj gravuloj estis videbla nekutima moviĝo, ĉar tian lingvon – Esperanton, ili verŝajne neniam aŭdis precipe dum tia publika programo elsendata en la tutan mondon.

Karaj gefratoj, mi dankas vin pro la pacienco aŭskulti mian kontribuaĵon memore al la sankta papo Johano Paŭlo la Dua. Dio vin benu! ■

*Miloslav Šváček*

# ŜTUPARO KIEL LA BIDOJ DE ROZARIO

Vilniuso 1939-1946 – la jaroj de la bolŝevisma-germana okupacio. La milito. Konstante ŝanĝiĝantaj armeaj frontoj, persekutadoj, morto embuskadis ĉie, bombardadoj, forportadoj, pafdetruadoj, ordonitaj fermoj. La konstanta timo pri tiuj plej proksimaj. Ĉu vespere ni estos ankoraŭ kune? Ĉu gepatroj, kiuj venis al vilaĝo, por akiri nutraĵon, revenos? – trajnoj ofte estis eksplodigataj fare de partizanoj. Mi vidis multfoje mortigitajn – dispecigitajn homajn korpojn. Ĉiuj tiuj dramoj kaj tragedioj de la tiama tempo estis metataj oferdone sur la ŝtuparon direktanta al la kapelo de la Dipatrino de Aŭrora Pordego en Vilno.




*La litovlingva nomo de la sanktejo „Aušros vartai” - Aŭrora Pordego - devenas de „Aštrieji vartai” - pollingve Ostra Brama - Akra Pordego*



*Dipatrino de la Aŭrora Pordego en Vilno*

La vilniusaj loĝantoj sin rifuĝas sub la gardon de Maria. Senĉese ili direktadis rigardon al ŝia mirakla vizaĝo dum ĉiutagaj vesproj, majaj diservoj, rozariaj kaj famaj aŭtunaj diservoj de „Protekto“. Ni ĉiuj kredis, ke Maria suferas kune kun ni kaj ke Ŝi komprenas nin. Ĉiu, kiu povis, rapidis ekde fruaj matenaj horoj ĝis malfruaj vesperaj horoj por partopreni en la senĉesa preĝa procesio honore al la Dipatrino de la Dia Mizerikordo. Ŝi gastigis en sia kapelo en la jaro 1935 dum la Sankta Semajno sian Filon la mizerikordan Jesuon prezentitan per la bildo „Jesuo mi fidas al Vi“, transdonitan al ni fare de la protektantino de mizerikordo fratulino Faustina. Ĉi tiun grandan eventon priskribas fratulino Faustina en sia Taglibreto.

La urbo Vilno estas sub la protektado de la Patrino de Dia Mizerikordo. En la Aŭrora Pordego troviĝas la kapelo, kaj sub ĝi la strato Aŭrorpordega (pollingve Ostrobramska). Sur la strato antaŭ la kapelo haltiĝadis ne nur loĝantoj de ĉi tiu urbo, sed ankaŭ la alvenintoj el ĉirkaŭaĵo. Mi multfoje vidis la

preĝantajn germanajn soldatojn. Sur la strato Aŭrorpordega mi trovis la sanktan bildeton, kiun tie perdis germana soldato kun la surskribo: „Germana soldato donis la oferdonon por celebro de 123 sanktaj mesoĵ“. Ĉi tiun bildeton mi konservis ĝis nun.

La rozaria preĝo de vilnanoj komencis surgenue ĉe la sojlo de la ŝtuparo gvidanta al la kapelo. Sur ĉiu ŝtupo de ĉi tiu ŝtuparo oni preĝis unu rozarian „Avemarion“ kaj tiamaniere la ŝtupoj ŝanĝiĝis je Rozario, kaj dume ĉiu ŝtupo estis aspergita per larmoj. La Dipatrino de la Aŭrora Pordego atente enaŭskultadis sin en ĉi tiun kalvarion. Kelkfoje la sama persono grimpadis al la Dipatrino petante savon, ŝirmon kaj malpligrandigon de ĉagrenoj. Mi ne memoras kiomfoje mi trairis ĉi tiun vojon, ĉiam mi revenadis kun la profunda bonfido, ke mi estis elaŭdita, ke ni postvivos tiujn ĉi nigrajn tagojn de la milito. ■

*Alina Makowiecka. El revuo Michael 9-10/ 2020 esperantigis Stanisław Śmigielski*

# LA KONGREGACIO POR KREDINSTRUO MALAPROBIS INTERKOMUNION EN GERMANIO

La Kongregacio por Kredinstruo ekskludis eŭkaristian komunecon inter la katolika kaj protestanta eklezioj en Germanio kaj teologie tion pravigis per tro grandaj diferencoj en konceptado de la Eŭkaristio kaj la eklezia ofico. Ankaŭ en tiu ĉi demando ne ekzistas bazoj por persona decido en konscienco, tekstas en la letero, kiun kardinalo Ladaria sendis al la prezidanto de la germana episkopara konferenco, al episkopo Georg Bätzing.

Pri la letero, datumita la 18-an de septembro 2020 kaj subskribita de la prefekto kaj sekretario de la vatikana ofico, informas germana portalo Vatican News kaj La Katolika Raportagentejo en Germanio. La Kongregacio por Kredinstruo per tio reagas al diskuta kontribuaĵo de la Ekumena laborrondo de la evangelianaj kaj katolikaj teologoj (ÖAK) en Germanio, kiu en la pasintjara septembro aprobis reciprokan partoprenon en eŭkaristia festeno. Akcepton de la dokumento rekomendis per sia starpunkto ankaŭ episkopo Bätzing, kiu intencis proponitan modelon validigi jam dum nunjara ekumena eklezia kongreso en Frankfurt (pro la kronviruso prokrastita al la jaro 2021). Nepre, atentigis tiam la prezidanto de la germanaj episkopoj, ni en la „komencita debata procedo ne kapablas imagi apodiktan: tiel ne!“

Al la letero de la vatikana kongregacio estas aldonita teologia analizo de la apartaj punktoj de la menciita germana ekumena deklaro. El kritika analizo rezultas, ke la dokumento de la germanaj evangelianaj kaj katolikaj teologoj nesufiĉe klarigas iujn bazajn demandojn de la katolika konceptado de la eklezio, la Eŭkaristio kaj konsekrado. La eŭkaristia komunumo kun la evangeliana eklezio en Germanio dum la nuntempa stato krome subfosus la ekumenan dialogon kun la ortodoksaj eklezioj, kaj tion ankaŭ ekster la germanaj landlimoj, argumentas la letero de la Kongregacio por la Kredinstruo.

La proparolanto de la germana episkopara konferenco Matthias Kopp konfirmis transprenon de la letero de la vatikana kongregacio kaj anoncis, ke la germanaj episkopoj ĝin pritraktos dum la aŭtuna plenkunsido en Fulda. ■

Fonto: www.vaticannews.va, 21.9.2020

*Ne nur tiu ĉi malpermesita interkomunio estis praktikata dum la ekumenaj E-kongresoj ĝis la jaro 2003. Post oficiala atentigo pri tiu ĉi nepermesita praktikado preskaŭ ĉiuj tiamaj katolikaj pastroj – esperantistoj agnoskis pravigon de tiu ĉi objeto, kaj ekde tiam ĝi ne plu estis praktikata.*

# LA 44-AJ PREĜTAGOJ EN ĈENSTOĤOVO, POLLANDO

Malgraŭ la malfacila tempo de la kronvirusa pandemio, la pola sekcio de IKUE decidis ne rompi longjaran tradicion kaj organizi laŭvican pilgrimadon de esperantistoj al Częstochowa.



La vetero dum la oktobra semajnfino (10-11) favoris nin kaj ni povis senprobleme realigi interesan programon, preparitan de nia pastro Roman Gmyrek – ne nur religian, sed ankaŭ turisman.

Sabaton matene ni vizitis Helan Monton, kiu, sen la kutima amaso da pilgrimantoj, aspektis iom strange kaj eĉ triste. Post la saluto al Reĝino de Pollando ni promenis sur la vasta spaco de la sankteja ĉirkaŭaĵo.

Posttagmeze, per luita buso, ni iris al Złoty Potok – belega turisma loko, en la vico de ĵurasaj kalkŝtonaj rokoj, inter Kraków kaj Częstochowa (Jura Krakowsko-Częstochowska).

Ni promenadis en la granda, belega, historia parko, kiu ĉirkaŭas la klasikisman palacon de la familio Raczyński. La palaco staras apud la pitoreska lageto Irydion, en kiu ĝi respegulas sian "vizaĝon". Najbare de la palaco estas situita biendomo, kiu apartenis al la familio Krasiński, nuntempe troviĝas tie Regiona Muzeo, dediĉita al la fama pola verkisto Zygmunt Krasiński, kiu en la jaro 1857 restadis tie dum kelkaj monatoj, ĉe siaj gepatroj. Dum tiu restado okazis la granda familia tragedio, ĉar mortis tie la plej juna filino de la verkisto - Elżbieta. Ŝi estas entombigita en la loka paroĥeja preĝejo. Tiun sanktejon ni ankaŭ vizitis, por partopreni en la esperantlingva sankta meso. La sekva atrakcia surprizo dum la ekskurso estis bongustega "rostita" truto, kiun ni manĝis sidante ĉe bordo de la lageto "Amerykan".

Reveninte „hejmen", ni pasigis agrablan vesperan tempon en la amika rondo – kantante kaj preĝante.



Kroniĝo de la pilgrimado estis la dimanĉmatena sankta meso, celebrita en Esperanto de la pastro Gmyrek, ĉepiede de la Helmonta Sinjorino. Estis ankaŭ eblo partopreni en ĝi virtuale, ĉar pli frue estis anoncite, ke okazos la rekta elsendo. La elsendo estis kon-





servita de Mikaelo Balicki el Wrocław kaj plu akireblas sur lia fejsbuka paĝo aŭ sur la paĝo, kiu nomiĝas "Liturgio de la Vorto". Uzi oni povas ankaŭ la suban ligilon.



**Resumante ni konstatas:** ke en la 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj partoprenis dudekkelk personoj. Estis bona tempo por ĉiuj, ĉar estis denove eblo renkontiĝi, babili, komune kanti kaj preĝi. Ni ankaŭ povis ekkoni silueton de la pioniro de Esperanto Józef Waśniewski, kiu naskiĝis en (vizitita de ni) Złoty Potok en la jaro 1858. Laŭ la Esperanta Vikipedio, li estis unu el la plej agemaj pioniroj de Esperanto, „nia Apostolo en Polujo", kiel diris Zamenhof (Lingvo Internacia n-ro 3/1897). Liaj verkoj troviĝas en La Esperantisto, Lingvo Internacia kaj Fundamenta Krestomatio. En 1896, lia originala novelo „En la brikejo" estis premiita dum la unua konkurso de Esperanto-literaturo. Li, la unua, komencis tre gravajn vojaĝojn inter esperantistoj.Oni povas diri, ke Waśniewski estis pioniro de Esperanto-turismo. Li ko-



respondis kun esperantistoj el Norvegio kaj Svedio, rezulte de tio li komencis vojaĝi en Skandinavio. Li lernis la svedan, popularigis informojn pri Skandinavio en Pollando, kaj pri la pola literaturo – en Svedio. En la pola ilustrita semajngazeto Wędrowiec (Vagabondo) Waśniewski publikigis la serion de artikoloj Wspomnienia z podróży na północ (Rememoroj el la vojaĝoj al la nordo).

Estas jam tradicio de la Preĝtagoj ligi en la programo spiritajn travivaĵojn kun turismo kaj movada edukado.





***Venontjare oktobre okazos jubileaj 45-aj Preĝtagoj 2021. Ni memoru pri tio.*** ■

*Teresa Pomorska*


Jen la ligilo al la esperantlingva sankta meso celebrita kadre de la 44-aj Preĝtagoj:
https://www.facebook.com/groups/kristanaro/permalink/3353965057990020

# NIGRA MADONO






2. En la brakoj de l´ Patrino / kvietiĝos nia kor´, / ĉar por sia infanaro / Ŝi radias per la bon´. / Kaj prizorgas nin patrine, / se oferas koron ni, / ripetante ofte, ĝoje vortojn ĉi: Ref.: Madono, Nigra Madono ...

3. Nin ĉirkaŭas maltrankvilo, / kien do rifuĝu hom´? / Do ni iru al Patrino, / ŝia koro pacodom´. / Ni petegas Vin, Maria, / ekrigardu al infan´, / aŭskultante nian preĝon en la kant´. Ref.: Madono, Nigra Madono ...

# EŬROPA ŜTATA DOKTRINO: ATEISMO
## Pri mondkoncepto de eŭropaj institucioj

***Rigardo sur globuson sufiĉas, por ke estu evidente, ke Eŭropo eksteriĝas kiel specifa kontinento ne pro geografiaj kaŭzoj. Cetere ĝi estas okcidenta elstaraĵo de vasta azia teritorio, dismembrigita per montarĉenoj, riveroj kaj maroj. Kio propradire indikas Eŭropon kiel tian?***

Tio estas plej bone videbla sur mapo de religiaj konfesioj. Ĝi estas spaco, kiu estas 1000 kaj ie 2000 jarojn signita per mesaĝo de Kristo.

Sed tiu unusenca karakteristiko estas hodiaŭ subpremata, eĉ neata. Debatoj pri rilato al Dio en Eŭropa Konstitucio unusence montris, ke nova koncepto de Eŭropo ne devas havi sian bazon en kristanismo. Ĝi eĉ al Dio, la Kreinto kaj instanco pli alta ol la homo tute ne referencas. La bazon de la nova konstitucio konsistigas la homaj rajtoj. Ĉarto de Bazaj Homrajtoj de la Eŭropa Unio havas 54 artikolojn.

Per kio distingiĝas tiu bazo? Ĝi estas homa konstituo, kiu povas esti ŝanĝita. Konvencio por Defendo de la Homaj Rajtoj el la jaro 1950 estis ampleksigita je 13 aldonaĵoj. Ĝi do estas neniu vera bazo simila al konstante valida Dia revelacio en la Nova Testamento, sed ĝi estas direktivo donita je dispono al ekzekutivo kaj sekularaj aŭtoritatuloj, eventuale al la ŝtatoj.

La ŝtata komunumo atribuas al civitanoj rajtojn. Ĝi estas la plej alta instanco, kiu decidas, kio estas la rajto, sendepende de superranga principo, kiu estas ekkonita revelacia religio, por kiu estas aŭtoritata la Dia Vorto. La homaj disponoj devas kun ĝi konformi, eĉ se neniam ili estas laŭvorte derivitaj el la revelaciita teksto. Mallonge: en fono de jursistemo staris en kristaneca Eŭropo kristana bildo de la homo. Tiu servis kiel rilativa kriterio por jurordo.

Sed nun ni staras fine de evoluo, kiu komenciĝis per Franca Revolucio kaj atingis sian supron en totalismaj sistemoj de nacisocialismo kaj komunismo, kaj nun ĝi fariĝis per demokratia vojo eĉ ĉefa kriterio: la plej alta instanco estas la homaj normoj. Nun tio estas per ŝtata komunumo firme difinitaj homaj rajtoj, kiuj determinas al kredo kaj la religiaj komunumoj kadron por iliaj aktivadoj. Neniu religio havas privilegiitan pozicion. Estas difinita religia neŭtraleco.

Menciinda tiudirekte estas decido de la Eŭropa Konsilantaro el la 29-a de junio 2007. Ĝi estas grava dokumento, ĉar la Eŭropa Konsilio per tio proklamas sin mem gardanto de la homaj rajtoj.

Estas okulfrape, ke en tiu decido estas neniu mencio pri kristana karaktero de Eŭropo. Nur oni konstatas, ke la religioj estas gravaj, „... ĉar estas historia fakto, ke ĉi tie dum jarcentoj ĉeestantis religioj, kiuj havis sian influon“ (art. 1). Neniu atentigo pri la kristanismo, eĉ ne pri ĝia ĉeesto.

Estas akcentata nur privata karaktero de la religio, nome „ĉiu religio, inkluzive de elekto al neniu kredo sin aliĝi, estas tute privata afero“ (art. 4). Per tio estas publika agado de la religio limigita je certa speco de reprezentado de interesoj kiel en ĉiu alia agadkampo. La kredo kaj ateismo estas starigitaj sur la saman nivelon. Eĉ pli, ĉar per tiu ŝajniga neŭtraleco en la aferoj de la mondkoncepto estas enkondukita ateismo kiel deviga en la tutan publikan vivon. La kredo perdas sian publike validan karakteron. Okazis tuta inverso: ne la ŝtato devas sin direkti laŭ principoj de la kredo, sed la kredo estas starigita antaŭ ŝtatan tribunalon. Tiu ordonas, kion oni en la religiaj aferoj faru: „Eĉ en la landoj, kie certa religio dominantas, oni devas instrui devenon de ĉiuj religioj“ (art. 14).

Aŭ se temas pri la religia libereco: „Sed tiu libereco ne estas nelimigita: la religio, kies

instruo aŭ praktikado estas nekunigebla kun aliaj bazaj rajtoj, estus neakceptebla“ (art. 16). Plue: „La ŝtatoj ankaŭ ne povas permesi disvastigon de la religiaj principoj, kiuj en la kazo de iliaj praktikadoj malrespektus la homajn rajtojn. En la kazo de duboj devas la ŝtatoj postuli de religiaj ĉefuloj unusencan starpunkton, se temas pri la homaj rajtoj kontraŭ religiaj principoj, kiel tion supozas la Eŭropa Konvencio por la homaj rajtoj“ (art. 17).

Tio unue sonas kiel eksplikanta, sed fakte ĝi malfermas eblecon de amasaj atakoj kontraŭ instruo kaj praktikadoj de la eklezio. Sufiĉas rigardi la artikolon 17 de la Eŭropa Ĉarto de la Homaj Rajtoj: „Diskriminacio pro la sekso, (...) religio aŭ mondkoncepto (...) aŭ pro la seksa orientiĝo estas malpermesita.“

Kiudirekten tio povas iri, estos baldaŭ evidenta en Grandbritio. Tien skribis ĉeĥa eŭrokomisionano rilate al laborokupo, socialaj aferoj kaj egaleco Vladimír Špidla al brita registaro en letero tion: „Grandbritio devas nuligi leĝojn, kiuj faras pro la religiaj motivoj certajn esceptojn el principo de nediskriminacio. Tio signifas: La eklezio ne rajtas rifuzi samseksemulojn eĉ ne perigon de adoptoj al samseksemaj paroj.“

Kaj kien tio plu direktos, estas videbla el rezolucio n-ro 24. 2. En ĝi oni postulas „sinsekve forigi el leĝodonado ĉiujn elementojn, se tio estas volo de la homoj, kiuj povus en vidpunkto de demokratia religia pluralismo senti sin diskriminaciataj.“

Per tio estis formulita nova dogmo: sekularismo, ignoranta Dion kaj el ekonomiaj, politikaj aŭ socialaj celkaŭzoj oni formas propran mondkoncepton, kaj tion pli malpli nerimarkite. Malgraŭ tio, ke la religiaj festotagoj kaj la religia instruado aŭ Diservoj ankoraŭ restas, sed intertempe okazas sur la socia nivelo silenta revolucio: jam dum kelkaj jaroj forpafas leĝdonado diversajn vivspacojn per detalaj reguloj: kiam, kie kaj kiel estas eble parkigi, kiaj higienaj normoj devas esti ĉie respektataj, kio devas esti skribita sur pakkovraĵo ktp., kaj kiel ili multiĝas, kuntiriĝas maŝo, kiu volas reguligi ĉiun vivopaŝon de la civitanoj.

En kelkaj kazoj povas temi pri pragmataj aferoj, kiuj havas neniun mondkonceptan aspekton. Kaj tamen: estas ĉi tie entrudigata vivmaniero pere de multegaj instrukcioj, kiuj verdire estas decidoj pri valoreca orientiĝo: oni ĉi tie ordonas la vivmanieron orientitan al formado de materialisma konsumisma socio, sed samtempe al persona limigado.

Nerimarkite la tuta Eŭropo ŝanĝiĝas je grego orientita al sekularismo, al klare ateisme direktita bildo de la homo, kaj tion tiel ruzece, por ke ĉi ĉio aspektu se eble kiel memevidenta.

El tiu spirita perspektivo poste neniun devas surprizi, ke la Eŭropa Kortumo por la Homaj Rajtoj unuanime voĉdonas por forigo de la krucoj. ■

*Verkis Christof Gaspari,*
*VISION 2000 – 1/2010*

## NI IOM RIDU

Centjara viro festas sian naskiĝtagon, alvenas al tiu solenaĵo ankaŭ ĵurnalistoj kaj kompreneble ili ankaŭ demandas, kiel la fortstatura maljunulo vivis. „Estas tio, sinjoroj, tiel. Mi edziĝis en la 25-a jaraĝo kaj poste ĉiam, kiam alproksimiĝis la kverelo, mi prenis bastoneton kaj mian hundon kaj foriris promeni. Nu, sinjoroj, certe vi komprenas, ke la promenoj dum la tri kvaronoj de la jarcento en la freŝa aero devas ja havi sian efikon.“

Renkontiĝas du amikoj. „Do mi, Venceslao, eksciis, ke vi edziĝis. Kio igis vin al tia decido, vin, tian malamikon de la virinoj?“ „Nu, komprenu, jam ĉesis gusti al mi tiuj restoraciaj manĝoj.“ „Nu, kaj kio nun?“ „Jam denove ili al mi bongustas, kaj tio en ĉiuj restoracioj.“